

REZOLUCIO PRI EDUKADO

La Komitato

vokas al Landaj Asocioj de UEA kaj Sekcioj de ILEI

- raporti pli komplete ĝis ĉiu jarfino pri la instruado de Esperanto en sia teritorio;
- kuraĝigi morale kaj materie instruistojn kaj instruantojn de Esperanto en sia membraro partopreni metodikajn kaj superajn lingvajn kursojn, kiaj tiuj organizitaj ĉiujare de ILEI kaj Kultura Centro Esperantista, de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, de la internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, de la Sanfranciska Ŝtata Universitato kaj la Internaciaj Metodikaj Seminarioj.

rekonas la sukcesan restarigon de la internaciaj ekzamenoj, kiujn trapasis 72 kandidatoj el dudeko da landoj en 13 sesioj en kvar kontinentoj.

kontentas pri la prestiĝo de regularo por la supera ekzameno kaj invitas al komitatanoj, Landaj Asocioj kaj Institutoj proponi taŭgajn membrojn por la formota Supera Ekzamena Komisiono.

La Komitato

konscias, ke libervolaj laborfortoj ne sufiĉas por la realigo de la kreskanta eduka agado kaj

apogas la paŝojn de ILEI transmeti partojn de tiu laboro sur profesian bazon kaj spegulante tion

aprobas la sekvan financon disponigon flanke de UEA por la periodo aŭgusto-decembro 1990, ekde kiam la financaj rilatoj funkcios laŭ la nova UEA/ILEI-interkonsento:

Eldono de instrurajtiga kursmaterialo	300 gld.
Starigo de la supera ekzameno	300 gld.
Administrado de ceteraj niveloj, legolisto, ekzercaro, pliaj testoj	300 gld.
Tralaboro de la arĥivoj de prof. I. Szerdahelyi	300 gld.
Situaci-komunika lernolibro	300 gld.
	-----
	1500 gld.

La rezolucion akceptis la Komitato de UEA en Havano je 1990 07 20.